

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

ALTKVALITE,
EFIKE!...

AKADEMIANO
GEORGI
KARASLAVOV

TAGO DE VIRINOJ

ANTAŬ 36-A
IFEJ
KONGRESO

DIMITAR ZLA-
TARSKI-
MITI

JUBILEA 10-A
VARE

ENLANDA MO-
VADO

ALBERT EINSTEIN



Malgranda kanto pri la virinoj de la tendaro Greenham Common

Grafikaĵo de Angel Angelov



de Vladimir GOLEV

En la milito niaj edzoj verŝas
batale sian sangon
kaj ni atendas ilin kaj amare ploras.

En la milito la infanoj niaj ekdormadas
en la okuloj kun teruro
kaj demandadas pri la patroj siaj.

En la milito niaj edzoj mortas,
farigas ni vidvinoj,
infanoj niaj — orfoj.

En la milito. . .
Sed nun batalas ni — edzinoj, amatinoj kaj patrinoj.
Nun ni batalas, antaŭ ol ekiros niaj edzoj ree
la vojon al la morto.

Ni ĉesis uzi niajn nomojn,
forĝesis niajn stratojn, niajn domojn.
Ni dormas tende. Manĝas konservajojn. Pluv' nin batas.

La mondo nin rigardas mirigite.
Kaj ĝi rigardu!
Ni estas simple nur virinoj de la tendaro Greenham
Common.¹

Sendomaj, ĉar ne dormas ni en niaj domoj.
Frenezaj, ĉar batalas ni senarmigitaj.
Senkompromisaj, ĉar malantaŭ ni la paco staras.

Kaj ni ne haltos,
ne silentiĝos,
ne rehejmeniĝos!

Ni, la fieraj virinaro de la tendaro Greenham Common.
Kun brakoj kontraŭ la raketoj,
kun la okuloj kontraŭ la raketoj,
kun krio kontraŭ la raketoj. . .

¹Legu: Griĵnam Koman



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 53

MARTO

3 • 1984

ALTKVALITE, EFIKE!...

La atingon de alta kvalito oni devas taksi kiel demandon de laborista konscienco kaj honoro, de prestiĝo de la laborista kolektivo kaj de la unuopa laborulo.

La kvalito de la produktaĵoj dependas de la laboro de ĉiuj en nia ekonomia sistemo.

La alta kvalito de niaj produktaĵoj devas esti levita en kulto — kaj en la laŭvorta, kaj en la plej sublima senco de tiu vorto.

TODOR JIVKOV

Dum la forpasintaj kvardek jaroj post la liberiĝo de Bulgario elsub faŝisma kaj kapitalisma jugo la popolo kreis novan soci-politikan ordon, novan ekonomian bazon. Evoluis la branĉoj de moderna industrio.

Multaj bulgaroj, elmigrintaj eksterlanden antaŭ jardekoj pro kruelaj ekonomiaj krizoj kaj senlaboreco en iama kapitalisma Bulgario, miloj da turistoj, vizitante nian patrolandon, ĉiam esprimas sian admiron, vidante la rezultojn de nia laboro dum la jaroj de socialisma konstruado.

Estas senduba fakto, ke la bulgaraj laboruloj plenumis la testamenton de la senmorta gvidanto kaj instruanto de la bulgara popolo Georgi Dimitrovo: „...dum 10—20 jaroj Bulgario devas atingi tion, kion aliaj evoluintaj landoj atingis dum jarcentoj...“

Ni plenrajte povas aserti, ke hodiaŭ nia socialisma patrolando merite viciĝis inter la evoluintaj ŝtatoj. Gi havas stabilan bilancon kaj ekonomion, estas preferata partnero ne nur por la evoluantaj landoj en la Tria Mondo, sed ankaŭ por multaj el la kapitalismaj landoj kiel Japanio, Italio, Anglio, FRG, Usono ktp.

Cio ĉi estas nekontesteblaj faktoj. Kaj tamen ĉio ĉi jam ne sufiĉas!

La bulgaraj laboruloj per sia sindona, in-

spirita laboro transformis ĉiaman postrestintan Bulgarion en modernan evoluintan industri-agraran landon. Nun denove ilia devo estas plialtigi la kvaliton de la produktataj varoj, de la sciencaj esploroj, de la kulturaj kaj artaj aranĝoj.

La bulgaraj esperantistoj — ĉiu en sia sfero — kontribuas por la evoluo kaj progreso de socialisma Bulgario, por la firmigo kaj plialtigo de ĝia aŭtoritato, digne reprezentas ĝin dum naciaj kaj internaciaj aranĝoj.

Kaj tamen tio jam ne sufiĉas!

Nia patriota kaj esperantista devo estas atingi pli altan nivelon de nia ĉiutaga laboro en uzinoj, entreprenoj, lernejoj, institutoj, en nia E-medio.

Nia devo estas perfektigi niajn lingvokonojn, plialtigi la nivelon de la E-instruado, de niaj E-kunvenoj, variigi ilin, fari ilin interesaj, allogaj.

Nia devo estas obstine nin prepari por ĉiu nacia kaj internacia E-aranĝo, prezenti kiel eble plej bone — speciale en la E-revuoj kaj belartaj konkursoj.

Nia devo estas plialtigi la lingvan nivelon, variigi la enhavon kaj plibonigi la kvaliton de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“, de ĉiuj esperantaj eldonoj en nia lando — revuoj, bultenoj, broŝuroj, k.a., kreskigi kaj perfektigi plurajn novajn talentajn ĵurnalistojn, tradukistojn, redaktorojn, korektistojn ktp.

Dum la preparperiodo por la antaŭstaranta celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, nia devo estas plivigligi nian aktivadon kaj propagandi Esperanton en ĉiuj medioj de nia socio per diversspecaj rimedoj kaj aranĝoj.

Nia patriota kaj esperantista devo estas fari ĝi modelaj laboruloj. Ĉiu sur sia laborloko — ni devas montri al niaj kolegoj, ke la esperantisto estas flama patrioto, konscia membro de la laborkolektivo, aktiva pacdefendanto.

Jen estas la plej grava tasko kaj devo de la bulgaraj esperantistoj responde al la postuloj de la vivo — plialtigo de la kvalito en ĉiuj sferoj de la nacia ekonomio.

AKADEMIANO GEORGI KARASLAVOV



Pasis okdek jaroj de post la naskiĝo de unu el la plej elstaraj nuntempaj bulgaraj verkistoj akademiano Georgi Karaslavov. Li forpasis antaŭ kelkaj jaroj estimata kaj aprezata ne nur en nia lando, sed ankaŭ eksterlande, precipe en socialismaj landoj. Lia verkaro okupas meritan lokon en la ora trezorejo de la bulgara socialisma kulturo.

Tie ĉi mi dezirus rememorigi iujn momentojn el miaj personaj kontaktoj kaj mia longdaŭra amikeco kun la granda verkisto.

Aŭtune de 1928 mi enmatrikuliĝis kiel studento pri agronomio en la Sofia Universitato. Georgi Karaslavov ankaŭ studis agronomion, sed jam ne estis nova studento. Laŭaĝe li ankaŭ superis min per kvin jaroj.

Jam estis aperintaj du liaj rakontaroj — „La ŝalmo ploras“ kaj „Stratbuboj“. Mi estis leginta ilin, sed apenaŭ nun mi havis eblecon konatigi persone kun ties aŭtoro.

Karaslavov estis modesta persono kaj ne fanfaronis pri siaj literaturaj okupoj. Ni rapide amikiĝis.

Mi estiĝis redaktoro de „Studenta Tribuno“ tuj post la enprizonigo de ties ĝistiamaj redaktoro Marko Temnjakov. La gazeto estis organo de la popola studentaro kaj firme defendis la interesojn ne nur de malriĉaj gestu-

dentoj, sed ankaŭ defendis la kulturon kontraŭ faŝismaj retrograduloj, luktis por demokrata evoluo de la juna bulgara ŝtato, liberigita el kvinjarcenta otomana jugo apenaŭ antaŭ kvin jardekoj.

Ni interparolis pri „Studenta Tribuno“ kaj Karaslavov alte taksis ĝian bataleman spiriton. La gazeto edukis la studentaron ne klini humile kapojn antaŭ la registara kaj universitata reakcio.

Nature, batalo sen viktimoj ne estas ebla. Karaslavov apartenis al grupo el kelkaj studentoj pri agronomio, eksigitaj el la Universitato en daŭro de du semestroj. Do, ĉiuj el la grupo devis prokrasti sian studadon dum unu jaro. Sed „Studenta Tribuno“ iniciatis kampanjon por kolekto de monsumoj por garanti al la eksigitaj eblecon forveturi en Ĉeĥoslovakion kaj daŭrigi sian studadon. Tiu fakto elokvente atestas pri la alta konscio de la popola studento. La grupo forveturis al Ĉeĥoslovakio. Tie oni devis labori por gajni vivrimedojn. Karaslavov ankaŭ laboris kiel ordinara konstrulaboristo en konstruado de la nova urbo Sporĵilov. Tiu laboro permesis al li daŭrigi la studadon.

Reveninte al Bulgario li utiligis siajn riĉajn impresojn kaj observojn por verki emociigan realisman romanon titolitan „Sporĵilov“. Tiu romano estis nova krea sukceso de Karaslavov. Li definitive formiĝis kiel verkisto — socialisma realisto.

Lia populareco kreskis. La proleta legantaro kaj malriĉa kamparanaro ŝatis liajn verkojn. Li estiĝis redaktoro de proletaj gazetoj kaj sisteme verkis rakontojn, artikolojn, eseojn, humuraĵojn.

Rezulte aperis kolekto de liaj rakontoj titolita „Sur posteno“. Ĝi estis pruvo pri lia verkista kapablo de rakontisto kaj novelisto. Li jam ĝuis la famon de unu el la plej konataj proletaj verkistoj. Post jaroj aperis liaj du romanoj el la vivo de la malnova bulgara vilaĝo „Daturo“ kaj „Bofilino“, ankaŭ kelkaj dramoj kaj aliaj prozverkoj. Dum la lastaj du jardekoj de sia vivo li sukcesis produkti aŭtentikan epopeon pri la batalo de nia popolo por libero kaj sendependeco titolitan „Ordinaraĵoj homoj“ (en ses volumoj). Tiu epopeo estas grandioza literatura verko. Karaslavov jam dumvive fariĝis klasikulo de la nuntempa bulgara literaturo, instruisto de pli junaj literaturaj generacioj. Liaj verkoj estas tradukitaj en multajn fremdajn lingvojn, estas konataj kaj ŝatataj de grandnombra legantaro en multaj landoj, precipe la socialismaj.

El Karaslavov sciis, ke mi estas esperantisto. Kvankam li mem ne estis lerninta Esperanton, li kun preteco ricevis de mi esperantajjn respondadojn el diversaj landoj por publikigo en la redaktata de li gazeto „Pogled“ (Rigardo), populariganta precipe la atingojn de socialisma konstruado en Sovetunio.

Foje mi petis de li permeson traduki en Esperanton iun lian rakonton. Li volonte konsentis kaj la traduko aperis en revuo „Balkana Laboristo“. Post kvin jardekoj, kiam oni impone festis tra la tuta lando lian 75-jaran jubileon, ni sofiaj esperantistoj petis lin ĉeesti kun sia edzino specialan esperantistan kunvenon. Kreiĝis tre bona amika etoso, li estis en bonega humoro kaj en sia dankparolado diris: „Mi dezirus rememorigi al vi tre agrablan al mi fakton. Kiam mi ankoraŭ estis juna kaj nekonata verkisto, unua traduko de mia verko estis prezentita en Esperanto fare de mia bona amiko kaj kamarado Nikola Aleksiev. Nun oni tradukis miajn verkojn en dekojn da fremdaj lingvoj, sed mi neniam forgesos, ke mia unua tradukisto estis esperantisto.“ Oni akceptis kun aklamoj tiun konfeson de nia ŝatata verkisto.

Tiutempe Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA) eldonis en esperanta traduko ankaŭ lian rakonton „Sur posteno“. Jam post la liberigo de nia popolo el sub faŝisma diktaturo oni tradukis en Esperanton lian romanon „Bofilino“, tre alte aprezitan de la esperantista



Sofiaj esperantistoj celebras la 70-an datrevenon de akademiano Georgi Karaslavov (13-an de februaro 1974)

legantaro.

Kiel akademiano Karaslavov rajtis subteni la proponon pri aljuĝo al UEA la Nobelan Premion por Paco. Kaj li oficiale faris tion kune kun kelkaj aliaj elstaraj reprezentantoj de la bulgara intelektularo.

Por mi persone estis granda honoro, ke akademiano Karaslavov verkis antaŭparolon al mia publicista libro „En la vicoj de la laborista klaso“, aperinta en 1977 en la ĉefurba eldonejo „Profizdat“.

NIKOLA ALEKSIEV

EL NIA FOTOARKIVO



Tiu ĉi foto estas posedaĵo de Ivan Vasilev Kostadinov el Kazanlâk. Ĝi prezentas kurson el 50 personoj — esperantistoj-entuziasmoj, kiuj lernis la Internacian Lingvon en 1938. En la mezo estas la kursgvidanto Petâr Kamburov (sidanta, kun lipharoj).

Ni esperas, ke tiu ĉi foto elvokos agrablajn rememorojn ĉe la iamaj gekursanoj, al kiuj la redakcio bondeziras sanon kaj feliĉon.

Al la sendinto — baj Ivan el Kazanlâk — niajn korajn dankojn!

★ heroo ★ pasinteco

VERA HOMO

KAJ KAMARADO



En la batalo kontraŭ kapitalismo kaj faŝismo kaj por la libero de la bulgara popolo, la vigla kaj batalema Ugarĉin donis multajn karajn viktimojn, inter kiuj estas Ilija Petrov Sojkov (Dojĉin) — partizano-esperantisto.

Pri lia vivo kaj agado rakontis lia frato Petko. Ilija estas naskita la 15-an de novembro 1915 en tre malriĉa vilaĝana familio en urbo Ugarĉin.

Jam kiel lernanto li devas forlasi la lernejon por perlabori sian panon ĉe la vilaĝaj riĉuloj.

De tiam li ekkonas la pezan vivon kaj la mizeron de la malriĉa bulgara popolo.

En 1932 li translokiĝas en Sofion kaj eklaboras en la teksa fabriko „Bulgario“.

Li estas membro de la Laborista Junulara Asocio (RMS) — kaj unu el la organizantoj de strikoj de teks-laboristoj, pro tio li estas maldungita kaj revenigita de la polico en lian naskiĝlokon.

En 1935 li estas denove en Sofio kaj loĝas duonleĝe.

En la fino de 1936 ĉe disvastigo de politikaj alvokoj, en kunpuŝiĝo kun policanoj li estas arestita kaj kondamnita je malliberigo. En la komenco li estas en la Sofia Centra Malliberejo kaj poste translokita en Vraca.

Tie li denove estas unu el la organizantoj de strikoj de la malliberuloj por pli bonaj vivkondiĉoj en la malliberejo. La striko sukcesis, sed Ilija estis punita kaj translokita en Pazarĝik.

En la malliberejo li legas multe kaj ĉi-tie lernas la Internacian Lingvon Esperanto.

En la printempo de 1941 li estas liberigita kaj revenas en vilaĝo Ugarĉin. Li jam estas membro de BKP (Bulgara Komunista Partio) kaj multe laboras por la politika edukado de gejunuloj.

Li estas helpanto de partizanoj. Regule li havigas al ili nutraĵojn kaj armilojn. Post la mortigo de la faŝista vilaĝestro — la 3-an de marto 1943 — li aliĝas al la partizanoj en Dua Ribelula Taĉmento de Loveĉ, kies vic-komandanto li estis pli malfrue.

En la kruda partizana vivo Ilija Sojkov — „Dojĉin“ montriĝis kiel vera homo kaj kamarado. La 7-an de januaro 1944, kune kun la komandanto de la taĉmento Petko Patarinski kaj ankoraŭ unu partizano (Bosjaka) ili triope defendis la batalpozicion kontraŭ la faŝistaj ĝendarmoj por savi siajn kamaradojn, kiuj sukcesis eskapi kaj saviĝis.

Eternan gloron al la herooj!

JORDAN ATANASOV

Pensoj de Zamenhof

„La batalantoj por nia ideo jam de longe konvinkigis, ke ĉiu nova grava verko, kiun ni povas montri al la publiko, efikas sur ĝin pli, ol ĉiaj plej lertaj teoriaj paroloj. . . Sed kiam la konstanta kreskado de nia literaturo (kun ĝi ankaŭ la kreskanta elasteco de la lingvo) iom post iom silentigos niajn nudavortajn malamikojn kaj malaperigos ĉian dubon pri la vivipoveco de nia lingvo, tiam vole-nevole, post 1 aŭ post 10 aŭ post 25 jaroj, la registaroj devos aliĝi al ni, kaj tiam „lingvo tutmonda“ fariĝos fakto plenumita. . .“

„Sed la plej efika maniero de propagando estus, se oni povus aranĝi migrantan teatran trupon Esperantan (mi pensas, ke en Parizo estus tre facile trovi impresarion, kiu aranĝus tiun trupon). Tia trupo, migrante tra ĉiuj plej gravaj urboj de Eŭropo kaj Ameriko kaj donante ĉie teatran prezentadon de iaj dramoj en Esperanto, aŭ almenaŭ dialogojn kaj kantojn en tiu ĉi lingvo, farus ĉie grandan bruon kaj alportus al nia afero riĉegajn fruktojn, ĉar nenia teoria parolado pri Esperanto povas tiel bonege efiki, kiel ludado de dramoj aŭ almenaŭ kantado en Esperanto.“

ESPERANTO — LA LINGVA KREAJO DE ZAMENHOF

Prof. d-ro E. A. Bokarev (Sovetunio)

Inter diversaj lingvoprojektoj de lingvo internacia, Esperanto sola fariĝis larĝe uzata. Neniu lingvoprojekto ne nur ne povis superi Esperanton tiurilate, sed esti eĉ iom komparebla al ĝi.

Kio estas la kaŭzo de tio ĉi? En esperantologia literaturo tiu fakto ordinare estas klarigata per pure sociologiaj kaŭzoj. Jam dekomence Esperanto fariĝis instrumento de praktika interkompreniĝo en pli-malpli granda kolektivo kaj estis traktata de ĝiaj adeptoj precipe de tiu vidpunkto, sed ne kiel objekto de teoriaj diskutoj. La periodo de teoriaj diskutoj, kiuj iaforte komenciĝis inter esperantistoj, ĉiam sekvigis malaltiĝon de ĝia disvastiĝo kaj praktika utiligo. Aliaj lingvoprojektoj, kontraŭe, restis precipe objektoj de teoria studado kaj diskutado. Estas atentinda la fakto, ke idistoj dum sia pli ol kvindekjara laboro eldonis sufiĉe multajn librojn, dediĉitajn al la lingvo mem (propaganda, polemika, instrua literaturo), sed relative tre malmultajn librojn pri scienco, belliteraturo k.t.p., kie Ido estus nur rimedo, sed ne celo: Ido ne fariĝis rimedo de pli-malpli larĝa uzado, ĉar idistoj fakte ne tion atentis unuavice en sia laboro. Do klarigo per sociologiaj kaŭzoj esence estas tute vera.

Sed detale tuŝi tiun sociologian flankon de la problemo ne estas celo de tiu ĉi artikolo. Ĝia celo estas iom trakti pure lingvan demandon, nome kiuj lingvaj trajtoj de Esperanto ebligis al ĝi fariĝi instrumento de interkompreniĝo kaj superi tiurilate siajn konkurantojn. La reprezentantoj de aliaj sistemoj de lingvo internacia precipe atentis en siaj teoriaj rezonadoj ne tiujn trajtojn, kiuj karakterizas lingvon internacian kiel instrumenton kaj esprimisistemon, sed tiujn, kiuj reprezentas iun teorian principon, tute ne plej gravan de praktika, funkcia vidpunkto. Por la t.n. naturalistoj (adeptoj de Occidental, Interlingua k.t.p.), ekzemple, kiuj ĉiam plej atentis la etimologian flankon de la problemo, sistemo kaj strukturo de lingvo internacia restis afero de duagrada, iaforte eĉ de nula, graveco. Ili ĉiam diskutis pri kriterioj kaj gradoj de natureco: ĉu estu atentata nur ĝenerala vortofunduso aŭ scienca terminaro ankaŭ, ĉu estu atentata nombro de lingvoj aŭ nombro de parolantoj, ĉu estu atentataj nur modernaj lingvoj aŭ la latina kaj greka ankaŭ, ĉu

estu atentataj nur romidaj lingvoj aŭ ankaŭ iuj aliaj k.t.p. La naturalistoj, atentante unuavice la similecon de internacia lingvo al la naturaj, similas homojn, kiuj penas taksu iun sistemon de aeroplano ne laŭ ĝiaj teknikaj, strukturaj kvalitoj, sed laŭ grado de ĝia simileco al natura birdo. Ofte impresas, ke adeptoj de iuj lingvoprojektoj, diskutante pri diversaj temoj de lingva teorio, tute forgesas, por kio iliaj lingvoj estas kreaĵoj, ĉu por esti kabinetaj etimologiaj sistemoj, ĉu por esti praktikaj rimedoj de internacia interkompreniĝo.

Kiuj do trajtoj de lingvo estas plej gravaj, se ni atentas ĝin kiel praktikan rimedon, respondantan al koncernaj postuloj de socia praktiko? Internacieco de lingva materialo estas tre grava en lingvo internacia, sed ĝi devas esti subigita al tiuj esencaj trajtoj de lingvo, kiuj karakterizas ĝin kiel rimedon de interkompreno: aŭtonomeco de lingva sistemo, integra kohereco de ĝiaj elementoj kaj reguleco-analogeco de ilia funkciado. Nur tio faras lingvon plej manovrebla kaj esprimkapabla en internacia interkompreno.

Ni analizu kelkajn trajtojn de Esperanto, kiuj karakterizas ĝin kiel principe pli taŭgan rimedon de interkompreno, ol multajn aliajn projektojn de lingvo internacia.

1. Oni devas opinii tre grava por lingvo internacia la eblecon libere krei laŭbezzone novajn vortojn pere de produktivaj vortderivaj elementoj. Kaj la sistemo de vortderivado en Esperanto devas esti alte taksata de tiu vidpunkto. Unue, ĝi tre faciligas la studadon de la lingvo kaj ebligas al ĝia uzanto kvante tre riĉan vortformadon anstataŭ studado de multaj pretaj kliŝaĵoj. Due, samtempe ĝi estas granda avantaĝo, ĉar ĝi ebligas al ĝia uzanto formi novajn vortojn, kiam aperas neceso pri tio. La sistemo de vortfarado en Esperanto faras la lingvon morfologie tre diafana. Kontraŭe, la „naturalismaj“ projektoj estas tre limigitaj je vortderivaj eblecoj, ĉar en ili precipe estas uzataj nur tiuj derivitaj vortoj, kiuj jam ekzistas en la naciaj lingvoj. En unu el plej naturalismaj projektoj, en Interlingua de IALA, praktika vortderiva sistemo fakte eĉ ne ekzistas, ĉar ĝia afiksaro estas nur etimologia sistemo de vortderivaj elementoj en naciaj lingvoj, ne regule kaj ne produktive uzataj en Interlingua.

2. Tre grava el funkcia vidpunkto estas ankaŭ la sintaksa diafaneco de la lingvo internacia, kiu ebligas tujan komprenon de sintaksa frazstrukturo, de uzata sintaksa modelo. En Esperanto tion ebligas parte jam la vortderiva sistemo, sed precipe specialaj karakteriziloj de ĉefaj morfologiaj vortklasoj: substantivo, adjektivo, verbo, adverbo. Tiuj karakteriziloj helpante larĝan vortderivon (ekz., telefono, telefona, telefoni, telefone), pliriĉigas la lingvon. Due, ili cementigas la pozicion, farante ĝian sintaksan modelon preciza kaj tuj komprenebla; se eĉ iuj vortoj en propozicio ne estas komprenitaj, specialaj vortfinaĵoj komprenigas ĝian ĝeneralan kaj abstraktan signifon: ...a ...isto ...le ...as ...aĵon de ...aĵ ...oj. Lingvoj sen tia kvalito multon perdas ne nur en sia esprimkapablo, sed ankaŭ en sia sintaksa diafaneco kaj precizeco.

3. De l'funkcia vidpunkto estas ankaŭ grava la libera vortordo en propozicio, ĉar ĝi ebligas la uzadon de inversa vortordo por pliriĉigo de senca enhavo de parolo, por intensigo de iuj sencaj nuancoj kaj kromsignifoj. Tion kaŭzas en Esperanto ne nur la vortkarakteriziloj, sed ankaŭ la akuzativo kaj varieblaj adjektivoj. Projektoj de lingvo internacia, ne havantaj tiujn eblecojn, multon perdas en sia precizeco kaj esprimkapablo. Nedevega akuzativo neniel kompensas tiun mankon, ĉar se ne uzata aŭtomate, la akuzativa karakterizilo ofte estas forgesata tiam, kiam ĝi estas esence necesa. Eĉ tiaj eminentaj idistoj, kiel L. de

Beaufront, ne nur unufoje, eraris, forgesante pri ĝia uzo en inversa vortordo.

Iafoje oni opinias la analizan lingvostrukturon pli perfekta ol la sintezan. Efektive, tre ofte la analizaj lingvoj estas pli simplaj ol la sintezaj, sed la kaŭzo ne estas la analiza strukturo mem, ĉar la sintezaj lingvoj (ekz., turkaj) ankaŭ povas esti tre simplaj. La uzo de kelkaj rimedoj de sintezaj lingvoj (ekz., de specialaj vortkarakteriziloj, de libera vortordo) estas tre valora el la funkcia vidpunkto kaj devas esti utiligita ankaŭ en internacia lingvo.

4. Ankaŭ la fonetika ortografio en Esperanto devas esti alte taksata el funkcia vidpunkto. Male, la tradicia ortografio de la „naturalismaj“ projektoj ne povas esti defendata, ĉar ĝi tute kontraŭas al la raciaj principoj de planlingvo.

Do la ĉefaj trajtoj de la lingva strukturo de Esperanto karakterizas ĝin kiel tre praktikan rimedon de internacia interkompreno kontraste al multaj „naturalismaj“ projektoj, kiuj malatentas la funkciajn vidpunkton, la plej gravan por lingvo internacia, kaj atentis unuagrade la etimologian flankon de la problemo, kiu tute ne estas ĉefa, se oni konsideras lingvon internacian kiel instrumenton de praktika interkompreno. Ne nur sociologiaj, sed ankaŭ pure lingvistikaj kaŭzoj destinitis al Esperanto larĝan praktikan utiligon kaj disvastigon.

(el „Memorlibro pri la Zamenhof-jaro, p. 31, 1960, UEA, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono)

Internacia Somera E-Universitato

(Veliko Târnovo, 23—29-a de julio 1984)

Post la sukcesa komenco pasintjara ĉi-somere ISEU funkcios duan fojon.

ISEU celas: aligi la ĝeneralan kaj lingvan kulturon, kreskigi amikajn sentojn kaj personajn kontaktojn eduki internaciismon, pacamon kaj humanismon.

ISEU ebligas aŭskulti raportojn de elstaraj preleganoj el diversaj landoj, koncernantajn sciencan, kulturan, literaturan, arton, socian vivon ktp.

Invititaj prelegantoj: **prof. d-ro Szerdahelyi Istvan** el Budapeŝto, Hungario, kandidato de juraj sciencoj, **Maria Pontika** el Ateno, Greklando, **doc. Vladimir Lemelev** el Samarkando (USSR), **Emilija Lapenna** el Zagreb, Jugoslavio, **prof. d-ro Stojan Ĝuĝev**, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, **prof. Kiril Popov**, **Belka Beleva** el la Supera Teatra Instituto en Sofio, **Violin Oljanov**, prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj kaj **Canko Murgin** — ĉiuj el Sofio, ka. La prelegoj estos popularaj, konvenaj por la meza esperantisto.

Prelegoj (kaj diskuto post ĉiu prelego) — nur antaŭtagmeze. Posttagmeze — konatiĝo kun la historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj de la romantika antikva urbo V. Târnovo, ka. Vespere — renkontiĝoj kun la lokaj esperantistoj, projekciado de filmoj, amuzaj programoj, dancoj, amika kunestado, promenadoj.

Kotizoj: por bulgaroj — 50 levoj, por eksterlandanoj — 80 levoj (nur por nutrado kaj loĝado, la ekskursoj estas senpagaj). Se iu preferas logi ĉe konatoj en la urbo, tiu devas pagi nur 15 levojn — alĝikotizo por ISEU.

Aliĝilojn kaj kotizojn bonvolu sendi ĝis la 1-a de junio 1984 laŭ jena adreso: **DSK, smetka 185-I-5745 na Okraĵno Esperantsko Râkovodstvo, 5000 V. Târnovo.**

Aliĝilojn petu je la sama adreso!

Detalajn informojn vi povas ricevi de: **Kunco Vălev**, ĝenerala sekretario de BEA, Sofio, tel. 44-34-51, kaj **ing. Todor Dimitrov**, tel. 062-26-51 (227), V. Târnovo.

TAGO DE LA VIRINO

Fidela kaj laborema

Ni festas kaj respektas la Tagon de Virino. Sen la virino la mondo perdus sian belecon kaj la vivo — sian sencon. Sen ŝi la domo dezertiĝus kaj la fajrujo estingiĝus.

Sin, la virinon, ni vidas dum la jarcentoj kiel ĉiaman kunulinon de la viro. Fidela kaj laborema, libera aŭ subpremata sklavino, ŝi tamen ĉiam estis forta kaj dezirata.

Antaŭ ŝi kliniĝis militestroj, la fajreroj en ŝiaj okuloj ekflamigis militojn, ŝia rideto pacigis malamikojn.

Si estas la tenera patrino, kiu per sia lukanto endormigas sian unuenaskiton. Si estas la heroa patrino, inspiranta kuraĝon kaj forton en la koron de sia filo, kiun ŝi sendas por venki aŭ morti. Si estas la fidela edzino etendanta flugilojn super sia hejmo. Si estas la kompatema fratino, kunmarŝanta dum la militiroj por bandagi vunditojn. Si estas la amatino, kiun portas en sia koro la batalanto.

Kaj ŝiajn ĝustajn aŭ erarajn paŝojn en la vivo, dum la jarcentoj, ĉiam gvidis Amo.

Sia vojo ofte estis suferplena, doloroj estis pli oftaj ol ĝojoj en ŝia vivo, sed ŝi kreskadis spirite dank' al la suferoj kaj nun ni vidas ŝin klera kaj libera — egala al la viro en ĉiuj sferoj, deziranta konduki la mondon al sunplena, sentempesta haveno.

Agante por paco inter la popoloj, ŝi plenumas sian sanktan devon kiel patrino de la homaro, sub kies protekto estas ĉiuj infanoj de la terglobo.

NEVENA NEDELČEVA

Printempa etudo

Florplena printempo jam proksimiĝas. Jen la unuaj printempaj gastoj — la cikonioj — alvenis antaŭ nelonge el la sudo en siajn malnovajn nestojn. Merloj aŭdiĝas, precipe frumatene. Goje ĉirpas paseroj en la arbustoj, unutone zumadas laboremaj kaj senlacaj abeloj. Eble baldaŭ oni aŭdos ankaŭ la kukolkrion. La herbejoj jam verdas, ornamitaj per multe da floroj — galanto, krokuso, primoloj, heleboro, violoj...

En la vasta kamparo estas videbla granda marĉo. Sur la bordo je unu piedo staras la cikonio. Per beko ŝovita en la plumaro, ĝi estas droninta en profunda meditado. Eble aten-

das aŭdi la voĉon de la ranoj!? Jen el la aero malsupreniĝis teren alia cikonio. Proksimiĝante unu al la alia, ili komencas longan klakadon per la bekoj. Versajne ili estas familia paro. La ranoj, aŭdinte la bruon, tuj subakviĝas.

Ne tre malproksime sole promenadas korvo. Funebre vestita en frako, ĉar antaŭ nelonge Baptino Vulpino kaptis kaj formangiĝis lian fraton.

Jen sur la telefondratoj sidiĝis hirundoj. Ankaŭ ili ĵus alvenis el la fora sudo. Ilia ĉirpado miksiĝas kun la kanto de la ŝaf-tintiloj.

La printempa tago estingiĝas, jam estas sunsubiro. Revenas hejmen la ŝaŝgregoj. Blovetas milda, varmeta vento. La kampoj silentiĝas, dronante en krepusko.

NIKOLA MITEV

Printempo venis!...



Laŭ malnova kutimo, komence de l'printempo vagantaj ciganoj kondukas dresitajn ursojn tra urbetoj kaj vilaĝoj. La urso plenumas surstrate diversajn akrobataĵojn kaj „dancas“ sub la muziko de popolinstrumentoj.

La spektantoj donacas al la „artistoj“ diversajn objektojn, frandaĵojn, monon...

Sur la foto: Nia simpatia samideanino, la ĵurnalistino kaj poetino Joanna Kraevá el Glojene (distrikto de Loveĉ), kun dresita urso sur la vilaĝa strato.



KONCIZE PRI LA HISTORIO DE IFEF

La unuaj klopodoj veki ĉe fervojistoj interreson al la faka Esperanto-movado estis faritaj jam en la jaro 1908. Pli konkretajn planojn entreprenis la franca fervojisto A. Berlande per alvoko en „Esperanto“ de la 20-a de marto 1909. Kiel rezulto de lia agado fondiĝis la „Internacia Asocio de Esperantistaj Fervojistoj“ (IAEF) la 7-an de septembro 1909, okaze de la 5-a UK de Esperanto en Barcelono. La fandan kunvenon ĉeestis 11 fervojistoj el 6 landoj. IAEF havis siajn jarajn konferencojn dum UK de Esperanto. En decembro 1910 aperis en Villeneuve St. Georges (Francio) la monata faka organo „Fervoja Esperantisto“, 8-paĝa, kiu fakte gvidis la asocion.

Jam en la jaro 1910 aperis ankaŭ lokaj grupoj de fervojistaj esperantistoj. IAEF atingis membronombron de 227 personoj en 15 landoj kaj penetris eĉ en Japanion.

La eksplodo de la Unua Mondmilito en 1914 ruinigis la promesplanan movadon de E-fervojistoj.

Tuj, kiam la paco permesis rekontaktigi, la restintaj membroj de IAEF ekklopodis restarigi la asocion. Ĝi refondiĝis en la jaro 1921, kiam dum la 13-a UK de Esperanto en Prago kunvenis fervojistoj el 13 landoj. La gvidadon de la movado kaj la eldonadon de propra asocia gazeto oni konfidis al ĉeĥoslovakaj fervojistoj kaj en julio 1923 aperis en Pilzen la unua postmilita numero de „La Fervojisto“, sub la redaktado de Josef Blážek.

Laŭ sia naturo la transportlaboro transpasas landajn limojn, estas esence internacia kaj ofte postulas sindikatan agadon en internacia skalo por defendo de komunaj interesoj de transportistoj en diversaj landoj. Tiu ĉi neceso provokis la fondiĝon de Internacia Federacio de Esperantaj Trafik- kaj Transportlaboristoj (IFETT). En ĝi membris ne nur fervojistoj, sed ankaŭ transport- kaj trafiklaboristoj de aliaj fakoj, kvankam praktike fervojistoj

plue konsistigis la bazon de la nova organizo. Tamen, diference de IAEF, ĝi konsistis ne el individuaj membroj, sed el landaj asocioj. La nova organizo estis intime ligita kun la strukturo kaj agado de la transportista sindikata movado. La fondo de IFETT trovis favoran akcepton inter esperantistaj fervojistoj. La juna federacio devis lukti kontraŭ la konsekvencoj de la ekonomia kaj politika krizo, atakanta la laboristan klason en la jaroj 1933/1934. La jaroj de la Dua Mondmilito ege malfaciligis la aktivadon de IFETT kaj preskaŭ nuligis ĝin.

Nur en aŭgusto 1948 enkadre de la 21-a SAT-kongreso en Amsterdamo fondiĝis la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEF), kiu poste ŝanĝis sian nomon al Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Estis elektita nova estraro: W. Stapel — prezidanto, Jan Lok — sekretario, k.a. — precipe el la amsterdama fervojista E-grupo.

La membronombro rapide kreskis kaj en 1967 IFEF povis fieri pri 2575 organizitaj membroj.

Nun oni povas aserti, ke IFEF estas unu el la plej viglaj internaciaj fakaj esperantistaj organizoj, kiu per sia aktivado kaj aplikado de Esperanto en la internacia trafiko vere kontribuas al la amikiĝo kaj interkompreniĝo inter la popoloj. Tiu ĉi aktivado ĉiufanke subtenas la sloganon de IFEF: „Reloj ligas landojn, Esperanto — popolojn“.

D. S. Ĥ.

FERVOJISTA SOCIETO

E-societo „Pirina Fervojisto“ festas la Novan Jaron 1984. Ĉiuj estas fervoraj kursanoj en 6-monata E-kurso, kiu komenciĝis en oktobro 1983, kaj ĉiuj intencas viziti la 36-an kongreson de IFEF en majo en „Slanĉev Brjag“. Ili deziras korespondi kun alilandaj geesperantistoj per sia kursgvidantino: Dimitrina Tonĉeva, bul. „N. Vapcarov“ 11, 2700 Blagoevgrad, Bulgario.





VARIA PROGRAMO DE LA 36-A KONGRESO DE IFEF

Lige kun la antaŭstaranta 36-a IFEF-Kongreso, kiu okazos de la 12-a ĝis la 18-a de majo 1984 en Slănčev Brjag (Suna Bordo), Bulgario, reprezentanto de la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ starigis kelkajn demandojn al la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato MARIN MARINOV, kiujn li afable respondis.

— Kiu, laŭ vi, estas la plej grava argumento por preni la decidon okazigi duan fojon en Bulgario la Internacian Kongreson de IFEF?

— Kiel sciате, en 1968, de la 11-a ĝis la 17-a de majo en Zlatni Pjasaci (Oraj Sabloj) apud Varna okazis la 20-a Jubilea Kongreso de IFEF. Tre bone organizita, okazinta en iu el la plej belaj lokoj de nia lando, la kongreso kontentigis ĉiujn partoprenantojn kaj multaj restis por ĉiam veraj amikoj de nia lando kaj de siaj kolegoj — la bulgaraj fervojistoj-esperantistoj.

Ne hazarde la nuna 36-a Kongreso de IFEF okazos denove en nia lando. En 1984 IFEF festos la 75-jaran datrevenon de sia fondiĝo. Do ĝia estraro firme kredas, ke nome en Bulgario tiun eventon oni festos plej majeste, plej amase!

— Kiom da kongresanoj oni atendas?

— La ĉi-jara 69-a Kongreso de UEA okazos ekster Eŭropo — en fora Kanado, pro kio la 36-a Kongreso de IFEF fakte estos la plej grava E-evento en Eŭropo. La intereso al nia kongreso ĉiutage plialtiĝas ne nur inter fervojistoj, sed ĝenerale inter la esperantistoj el ĉiuj landoj de Eŭropo. Miaopinie ĝi transformiĝos en veran kongreson de UEA, t. e. plenigos la mankon dum tiu jaro de la tradicia esperanta atmosfero en nia kontinento. Laŭ anticipaj donitaĵoj, la kongreson partoprenos pli ol 1000 esperantistoj! Por unua fojo en kongreso de IFEF partoprenos kelkcent fervojistoj-esperantistoj el la socialismaj landoj, inkluzive el Sovetunio.

— Kiaj plej gravaj fakaj kunvenoj okazos dum la kongreso kaj kiaj problemoj estos traktataj?

— Laŭtradicie la kongreslando rajtas pre-

pari la ĉefan kongresan fakprelegon. Tiu ĉi prelego pri temo „Ŝtato kaj perspektivoj de la Fervojtransporto en P. R. Bulgario“ jam estas preta. Ĝi estas verkita de ing. Rad Sinigerov, ĉefredaktoro de revuo „Fervojista Transporto“, presorgano de la Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj (BSF). Mi firme kredas, ke niaj eksterlandaj kolegoj ricevos ĝustan impreson pri la atingoj de nia fervojtransporto, precipe dum la lastaj jardekoj!

— Kia estas la kontribuo de IFEF-kongresoj por evoluo de la internacia fervojtrafiko? Kion vi atendas de la ĉi-jara IFEF-kongreso?

— Multflanka estas la kontribuo de la IFEF-kongresoj por evoluo de la internacia fervojtrafiko. Pere de fakprelegoj, filmoj kaj diapozitivaj, fakaj interparoloj, disputoj kaj interŝanĝo de sperto, dank' al la simpla fakto, ke dum la kongresoj oni interparolas kaj interkompreniĝas nur en Esperanto, ege plibonigas la specifan fervojan informadon. Krome, la gekolegaj-fervojistoj havas la eblecon persone konatiĝi kun la kongresa lando, propraokule konvinkiĝi pri ĝiaj atingoj.

— Kiajn amuzaranĝojn kaj ekskursojn antaŭvidas la kongresa programo?

— Krom la fakaj prelegoj, ekspozicio pri la atingoj de nia fervojtransporto, filmoj, diapozitivaj ka., ni strebos distri niajn kolegojn per belartaj programoj. En la kongresa programo estas antaŭviditaj: koncerto kun partopreno de elstaraj kantistoj-esperantistoj, E-horo, folkloraj ensembloj, Vespere de E-teatro, vizito de plaĝo, dancoj ka.

— Kiamaniere LKK helpas al la eksterlandaj gastoj konatiĝi kun nia lando kaj kun nia vivkondiĉoj?

— Krom la antaŭviditaj ekskursoj al Varna (Zlatni Pjasaci), al niaj historiaj lokoj kaj urboj — Ŝumen, Preslav, Pliska, Madara, dank' al la disponigitaj al ĉiuj kongresanoj biletoj por senpaga veturado tra la tuta lando, validaj de la 7-a ĝis la 23-a de majo j.k., la kongresanoj povos plilongigi sian restadon en nia lando kaj de proksime konatiĝi kun ĝiaj vindaĵoj. Nigra Maro, Roza Valo, Rodopi-montaro, la belega konstruaĵo de la Internacia E-Kursejo en Pisanica, Rila-monaĥejo, Vitoŝamonto apud Sofio estas vere allogaj objektoj, kiujn ili povos viziti kaj ĝui ilian belecon.

DIMITĀR ZLATARSKI — MITI



Fine de 1983, lige kun lia 80-jariĝo, la E-poeto Dimitar Ivanov Zlatarski estis distingita per la alta ŝtata titolo Heroo de Socialisma Laboro kaj dekorita per la ordeno „Ora Stelo de Popola Respubliko Bulgario“.

D. Zlatarski naskiĝis en Varno (20. 10. 1903), kie li finis gimnazian studon. Poste li fariĝis instruisto kaj oficis en vilaĝoj Drumevo (distrikto de Sumen), Sava, Krasimir kaj Dalgopol (sud-okcidenta parto de distrikto Varno). La juna instruisto ofte ŝanĝis sian laborlokon pro persekutoj fare de lernejoj inspektoroj kaj aliaj potenculoj de la kapitalisma administracio. Li tre ŝatis labori inter la vilaĝanaj polamasoj, tial li — varnano — fariĝis konstanta loĝanto de vilaĝo Dalgopol (nun jam urbo).

D. Zlatarski estis abunde dotita de la naturo. Li ŝatis muzikon kaj ludis violonon, samtempe interesiĝis pri belliteraturo, sociologio kaj naturscienco. Li helpis al fratoj Skorpil (ĉeĥoj) en iliaj arkeologiaj esploroj, akompanis universitatajn sciencistojn (geologoj, mineralogoj, botanikistoj, zoologoj, etnografoj), kiuj faris sciencajn esplorojn en la distrikto de Varno. La junulo D. Zlatarski intencis studi en universitato, sed li tion ne faris. La kunlaboro kun sciencistoj el diversaj fakoj helpis al li koni la ĝeneralan kaj fakan literaturon pri diversaj sciencoj.

Sen studi universitaton, laŭ vojo de memklerigado, li atingis konojn de universitata nivelo en kelkaj sciencaj branĉoj (botaniko, zoologio, geologio, arkeologio, etnografio kaj

filologio). La juna instruisto D. Zlatarski, unue sola, sed poste li mem faris grupon de siaj kolegoj kaj lernantoj kaj esploris komplekse la naturon de la ĉirkaŭaĵo kaj la historion de la loĝantaro ekde neolito ĝis nun. Oni kolektis 15 000 papiliojn. Inter ili estis speco de papilio nekonata al la scienco ĝis tiam. Ĝi estis registrita en la entomologio sub lia nomo. En 1948 li donacis al la Bulgara Akademio de Sciencoj (en Sofio) sian riĉan kolekton de mineraloj kaj samtempe donacis sian kolekton de aliaj objektoj por fondi lernejan muzeon, sur kies bazo komence de 1950 oni fondis muzeon en Dalgopol, kiu nun estas unu el la rimarkindaĵoj en distrikto de Varna. D. Zlatarski faris malkovrojn en la arkeologio. Pri ili li aperigis sciencajn artikolojn aŭ komunikojn. Apud vilaĝo Asparuhovo li trovis spurojn de nekonata ĝis tiam en Eŭropo epoko (kulturo) el la dua duono de la kvina jarmilo antaŭ la nova erao.

Tamen D. Zlatarski interesas nin precipe kiel esperantisto kaj Esperanto-poeto. Li lernis Esperanton en gimnazio (1920—1921) kaj komencis verki de 1923. En la jaro 1923 li partoprenis la unuan landan kunvenon de la bulgaraj laboristaj esperantistoj, okazinta neoficiale dum la X kongreso de bulgaraj esperantistoj en urbo Veliko Tŕrnovo. Li aktive laboris en la Bulgara Laborista Esperantista Asocio (BuLEA) kaj kunlaboris en ties organo „Balkana Laboristo“ (1929—1934). Liaj originalaj poemoj en Esperanto kaj prilingvaj artikoloj en la E-gazetaro estas neelviŝeblaj spuroj, lasitaj de li en la internacilingva movado. En 1923 estas presitaj liaj unuaj poemoj en Esperanto. Kaj dum tutaj 60 jaroj li verkis poezion en Esperanto. Bedaŭrinde, lia E-poezio estas konata nur al la fakuloj, ĉar ĝis nun liaj poemoj ne aperis en memstara libro. Lia unika kontribuo al la originala E-poezio estas lia poemo „Fajrego“, kiu estas verkita en 1924—1925 kaj pentras la bildon de la kontraŭfaŝisma ribelo en Bulgario (septembro 1923). La komenca parto de la poemo estis publikigita en „Bulgara Esperantisto“ (1924), poste la redakcio ĉesigis pluan aperigon pro la vandalaj persekutoj fare de la faŝistoj. La manuskripton oni konsideris malaperinta, sed post preskaŭ 40 jaroj ĝi estis retrovita en iu malnova gazetakajero. Por unua fojo ĝi aperis en la Jarlibro de la Supera Pedagogia Instituto en Sumen, Filologia Fakultato, volumo IV, Sofio — 1980, p. 155—164, kaj en 1983

estis represita en la antologio „Septembro estis ĝis Majo“, Sofia-Pres, 1983, p. 181—185.

Dimităr Zlatarski rajte povas esti konsiderata kiel unua aŭtoro de revolucia Esperanto-poezio en Bulgario. En la periodo 1923—1935 li verkis dudekon da poemoj precipe kun intim-lirika temaro. Se tiuj teneraj poemoj estus kolektitaj en poemaro, nun li eble estus mondkonata E-poeto. Kiam en 1958 aperis „Esperanto-Antologio. Poemoj“ (eldonejo „Stafeto“, Kanariaj Insuloj), iuj poetoj kaj fakuloj pri historio de E-literaturo esprimis sian indignon pro la fakto, ke en la menciita antologio D. Zlatarski ne estis prezentita. Oni senkulpiĝis sin per la fakto, ke liaj poemoj ne aperis en aparta libro. En la nun preparata Esperanto-Antologio de la monda E-poezio estos presitaj ankaŭ poemoj de Zlatarski.

La jaroj 1936—1944 ampleksas la duan kreaĵan periodon de la poeto. Tiam li verkis sufiĉe da poemoj, kiuj povus konsistigi lian „duan“ poemaron. Dum tiu periodo la intimplirika poemoj estas ne multaj, sed kreskis la nombro de poemoj kun soci-revolucia temaro. En 1936 la poeto verkis himnon de E-Societo „Albatroso“ en Varna. En 1940 Zlatarski aperigis kvar poemojn sub pseŭdonomo D. Fajro. En la unua el ili li prezentas la neenviindan sorton de la kondamnitaj je malliberigo kontraŭfaŝistoj, kiuj pasigas sian vivon malantaŭ la muroj de malliberejo. En la dua poemo, „JNRJ“ la 12 Kristo-apostoloj ŝajnas al li similaj al la 12 herooj el la poemo de Aleksandr Blok, kaj en la ceteraj du poemoj — „La mirinda lando“

kaj „Al la blanka insulo“, la poeto majstre skizas la landon de siaj revoj, la landon de komunismo.

Elkreskinte en Varno, sur la bordo de la Nigra Maro, Zlatarski bone konas la potencon de la maro. En sia poemo „Maro“ li pentras la maron en ondado, en kvieto kaj en ŝtormo. Sed la leganto klare komprenas la alegorion — la Maro estas la popolo kaj la marŝtormoj — la sociaj revolucioj por pano kaj libero. Tiel, eĉ en la kondiĉoj de sangavida faŝismo, Zlatarski trovis manieron por direkti siajn legantojn al la revolucia ideo pri rekonstruo kaj perfektigo de la malnova mondo.

Per larĝa ŝvingo de sia krea penso Zlatarski pentras ankaŭ iun alian naturforton — la riveron („La printempa rivero“, 1941). La rivero ŝajnas al li simila al malgranda drako, kiu suĉas forton el la montara brusto kaj poste sin jetas laŭ la rivervalo kaj „flugas“ al la Maro. La poeto, sidanta sur la bordo de tiu printempa rivero, konkludas, ke la rivero estas eterna, sed la vivo de aparta homo — tre mallonga.

Post la Dua Mondmilito komenciĝis la tria periodo en la E-verkaro de Zlatarski — ekde 1945, kiu daŭras ankaŭ nun. Dum tiu periodo li prikantis la socialismon, la pacon, senmaskigis la faŝismon kaj imperiismon.

Ni estas feliĉaj gratuli lin okaze de lia 80-jariĝo. Ni bondeziras al li longan vivon kaj pluan verkadon kaj ni esperas, ke lia tuta poezia verkaro baldaŭ estos kolektita kaj eldonita en aparta libro.

CANKO MURGIN

NIGRA MARO

Mian barkon ruinigis ĉe la bord' tempest' aŭtuna
kaj ĝi kuŝis sur la sablo, sub la algoj verde-brunaj.
Kaj kun la doloro muta marŝis mi amarebria
sub la pluv' folia.

Kaj malfermis tiam urbo de turmentoj la abismon,
kaj sur stratoj mi ekmarŝis kun profunda pesimismo.
Kaj mi vagis kvazaŭ sonĝe ĝis malfrua nokta horo —
kun sanganta koro.

...Kaj en tagofluo kreskis la figuro de l'inkubo,
kiu nokte super urbo, de l' fabrikoj kamentuboj
per okuloj fajraj suben ŝtelobservas kaj minacas
rompi ĉiun pacon.

Kaj interne en la brusto bolis kvazaŭ mil amaroj,
kaj ĉirkaŭe bruis tondre kaj freneze Nigra Maro.
Multaj koroj malbenitaj kaj trompitaj de la sorto
serĉis sian morton.

Mi ekamis kaj admiris la malriĉajn miajn fratojn,
kiuj portis pezan krucon de suferoj kaj malsato —
sed en sia kor' decidis almiliti eĉ per sango
la Insulon Blankan.

...Kaj en mia horo lasta — kiam kisos sangostrio
miajn lipojn morte palajn — mi deziris nur, Maria,
ke min lasu miaj fratoj kuŝi sur la fundo mara —
ĉe la tombo kara.

Marto 1929

D. ZLATARSKI

ALVOKO

Lige kun la 20-jara datreveno de la fondo de Bulgara E-Muzeo, 40-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario kaj 100-jara jubileo de Esperanto la sofiaj esperantistoj alvokas ĉiujn samideanojn enlande kaj eksterlande kontribui al la Bulgara E-Muzeo per donacado de libroj, periodaĵoj, fotoj, materialoj kaj aliaj objektoj, ligitaj kun la historio de Esperanto en Bulgario.

La donacado estas nobla faro. Ĝi estas pruvo de inde plenumita devo fare de la bulgaraj esperantistoj al sia Bulgara Esperantista Asocio — heredanto de gloraj tradicioj.

Ĉiujn materialojn sendu laŭ adreso: Urba Estraro de BEA-Sofio, str. „Il. Makariopolski“ 4, BG-1202 SOFIO, Bulgario.

C. Stop-Bowitz — 70-jara



Oni havas la impreson, ke la nomo de C. Stop-Bowitz ĉiam ekzistis en la esperantistaj medioj, kaj ne nur en Oslo, ne nur en Norvegujo, sed en la tuta mondo. Iam ankaŭ li devas atingi la aĝon de ekŝigo el ordinara laboro. Tion oni povas nur bedaŭri. Ĉar C. Stop-Bowitz ne estas nur homo, kaj certe ne ordinara homo, li vere estas institucio. Neniu faris tiom por Esperanto en Norvegujo — kaj lia laboro estas nepre ĉia: verkado de sciencaj artikoloj, sed ja ankaŭ temporaba kartotekordigado kaj respondado al leteroj de kiu ajn, kiu montras la plej etan intereson pri Esperanto. Lia sindono estas senfina, kaj ni kaptas la okazon danki, ĉe ĉi tiu stacio en lia vivo, danki serioze kaj solene al tiu efektive tre modesta persono, tiu ŝercemulo, kiun alte aprecas liaj studentoj (kion mi persone havis la okazon konstati), kaj kiun alte ŝatas kaj respektas liaj amikoj kaj kunlaborantoj.

Esperanto estas la mondo de Stop-Bowitz. Aŭ pli ĝuste: Esperanto estas unu el liaj du mondoj. Ĉar li ja estas ankaŭ zoologo, efektive sciencisto en sia fako, kun solena Doktora titolo ĉe la Universitato en Oslo. Li estas, sendube, la plej granda spertulo pri lumbrikoj en Eŭropo. Li estas prezidanto en la komitato pri norvegaj bestnomoj, li kunlaboris pri la zoologiaj partoj en pluraj leksikonoj kaj estis ĉefredaktoro de Jordens Dyreliv, same kiel li, kompreneble, estis ĉefkunlaboranto pri zoologio en Plena Ilustrita Vortaro. Studvojaĝojn li faris al Japanujo, Sud-Ameriko kaj Aŭstralio.

Gisosta esperantisto li estas de 1928. Li

estis prezidanto de Klubo Esperantista en Oslo, prezidanto de Norvega Esperantista Ligo — efektive dum tridek jaroj! — vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista, kaj — kompreneble — membro de Akademio de Esperanto. Ĉu ni ankaŭ menciu: prezidanto de Ekzamena Komisiono de NEL* — jam de antaŭ 1950! — preleganto de Someraj Universitataj Kursoj en Belgujo trifoje, prezidanto de la Universala Kongreso en Oslo 1952. Li cetere partoprenis 20 Universalajn Kongresojn.

Por ĉi ĉio kaj pro cent aliaj meritoj oni honoris lin per Honora membreco en UEA kaj per la ordeno de NEL, Komandoro de la 1-a klaso de Pro Merito. Neniu vorto pli ol *Merito* karakterizas nian jubileulon. Karakteriza estas eldiro de membro de la Jubilea Komisiono: „Kiam ni ne plu havos Stop-Bowitz, ni bezonos elektronikan kalkulmaŝinon en la oficejo de NEL.“

Akceptu la sincerajn gratulojn de ĉiuj norvegaj esperantistoj!

*NEL — Norvega Esperantista Ligo

JOHAN HAMMOND ROSBACH

(El „Norvega Esperantisto“, 6, 1983)

RENKONTIGO KUN AŬSTRALIO

Fine de 1982 anonciĝis la „Unua Internacia Konferenco pri Polihetoj“ okazonta en Sidnejo, Aŭstralio, en julio 1983. Estante specialisto pri tiaj vermoj mi aliĝis, kaj, kiel kutime, kiam mi iras al eksterlando, mi kontaktis ankaŭ la lokajn esperantistojn. Mia multjara amiko W. Chandler, fakdelegito de U.E.A. pri diversaj zoologiaj temoj, tuj skribis, ke mi restu multajn semajnojn, kaj li aranĝos, ke mi vidu tutan Aŭstralion. Oni ja ne iras ĉirkaŭ la duono de la terglobo nur por unusemajna konferenco, sed mi disponis bedaŭrinde nur unu plian semajnon. Mi proponis prelegojn en kelkaj Esperanto-kluboj.

Post la konferenco afable gastigis min la delegito de U.E.A. en Manlio, s-ino Marjorie Duncan. En la vesperoj mi prelegis kun lumbildoj pri Norvegio en la kluboj de Sidnejo kaj Manlio.

Nun mi havis ankaŭ specialan deziron. Sur limigita areo en la proksimeco de Melburno, kaj nur tie, vivas la konata giganta aŭstralia ter-vermo: tiun mi neepr volis vidi. W. Chandler skribis al Herbert Koppel en Melburno, kiu kontaktis la Naturhistoria Muzeon de la urbo. Tie oni unue respondis, ke la vermo estas „minacata“ besto, kaj oni nevolonte per-

mesas vizitojn al la loko, sed aŭdinte, ke temas pri eŭropa zoologo-specialisto, oni reagis pli pozitive. Tamen H. Koppel serĉis kontakton ankaŭ kun du kamparanoj, kiuj asertis, ke la vermego abundas en iliaj bienoj, kaj kore invitis min viziti ilin.

Sekve mi flugis al Melburno, kie s-ro Koppel kaj la delegito de U.E.A., Svetislav Kanački, akceptis min. Tiu lasta unue veturigis nin al la naturparko en Healesville, kie ni ankaŭ vizitis la lokan delegiton de U.E.A.; vespere mi prelegis pri Norvegio en la Esperanto-

klubo. La postan tagon li veturigis nin al la menciitaj bienoj. La kamparano kaj lia familio estis tre afablaj, veturigis nin sur la kampon kaj fervore asistis elfosante la vermegojn. Ĉar estas vintro en Aŭstralio en julio, ni trovis nur idojn de 1¹/₂ metro, dikajn kiel dikfingro, dum la plenkreskaj povas atingi la longecon de proksimume 3 m. Entute la „ekpediscio“ estis tre sukcesa!

C. STOP-BOWITZ

(„Heroldo de Esperanto“, n-ro 15
(1722), 26. 11.83, p. 3)

NEFORGESEBLA E-FESTO EN GORNA ORJAĤOVICA

La 14-an de januaro la esperantistoj de Gorna Orjaĥovica celebris gravan datevenon — a 75-jaran jubileon de sia urba E-societo „Espero“.

La celebrego komenciĝis per komuna foto kaj prezento de florkronoj antaŭ la monumento de la fama batalinto kontraŭ la otomana jugo Georgi Izmirlijev kaj antaŭ la Frata Tombejo.

La solena kunveno okazis en la granda salono de la Modela Popola Legejo „Napredāk“. Antaŭ pli ol 500 esperantistoj el la tuta lando kaj lokaj urbanoj la prezidanto de E-societo „Espero“ Dimităr Petkov faris raporton pri la historio kaj nuntempa stato de la E-movado en Gorna Orjaĥovica. Li substrekis, ke jam fine de la pasinta jarcento en la urbo propagandon pri Esperanto faris Ĥristo Popov — popola instruisto en la proksima vilaĝo Dolna Orjaĥovica, unu el la plej konataj pioniroj de Esperanto en nia lando. Elstara esperantisto de Gorna Orjaĥovica kaj eminenta pioniro de Esperanto estis ankaŭ Ĥristo Rjaĥovski, kiu, fariĝinte advokato, translokiĝis en urbo Levski, kie li eldonadis la senpagan propagandan ĵurnalon „Trumpetisto“. Fine de la sama periodo en la urbon venis alia fama bulgara esperantisto — Georgi Oreškov, kiu eklaboris en la poŝtoŭicejo kiel telegrafisto. Popov kaj Oreškov eldonis en 1900 bonan lernolibron de Esperanto, laŭ kiu lernis la lingvon miloj da bulgaroj. En 1908 la esperantistoj de Gorna Orjaĥovica organizis sin en E-societo „Espero“, kiu travivis multe da peripetioj, sed ĝisvivis la popolan venkon en 1944.

En la tridekaj jaroj Esperanto fariĝis tre populara inter la progresemaj intelektuloj kaj laboristoj. Oni komencis fervore lerni la lingvon eĉ en prizonoj kaj koncentrejoj. En la malliberejo de Veliko Târnovo la lingvon lernis Dimităr Djulgerov (Kiskinja), kiu poste fariĝis fama komandanto de partizantaĉmen-

to. Perfekte ellernis la lingvon ankaŭ la poeto-partizano Ĥristo Kozlev. Ili ambaŭ heroe pereis en la kontraŭfaŝisma batalo.

Post la liberigo el sub la faŝismo en 1944 la E-movado en la urbo rapide restariĝis. Eklaboris la malnovaj esperantistoj, venis novaj: Ivan Gipov, fratoj Marin kaj Ivan Ĉenkov, Rajĉo Angelov k.a. En 1973 kiel prezidanto de societo „Espero“ estis elektita la energia kaj iniciatema Dimităr Petkov, kiu seninterrompe estas reelektata kiel gvidanto de la societo ĝis nun. Li fondis ankaŭ lernejan E-societon en la urbo. Fortan antaŭenpuŝon la E-movado en la urbo ricevis post la enkonduko de Esperanto en la mezlernejojn. Nun la lingvo estas instruata en 7 el ĉiuj 12 lernejoj en la urbo.

Post la interesa raporto de D. Petkov oni adreŝis al la jubileuloj multajn salutparolojn: k-do Darakĉiev, en la nomo de la Urba Komitato de Patrolanda Fronto kaj la UK de BKP, Kunĉo Vălev — en la nomo de CE de BEA (li ankaŭ dekoris la brustojn de pli ol 20 E-veteranoj kaj aktivuloj per la ora kaj arĝenta insigno de BEA), k-do Dimităr Ĥaĝiev — prezidanto de la bulgara sekcio de MEM, pli ol 30 reprezentantoj de distriktaĵ kaj societaĵ estraroj el la tuta lando.

La impona celebrego finiĝis per altnivela koncerto, kiun partoprenis geartistoj-esperantistoj el Sofio (Angelina Sotirova, Maria Angelova, Dimităr Denĉev), el Ruse (Jana Cikalova), el Gorna Orjaĥovica (Antoaneta Panova). Muntajon prezentis grupo da lernantinoj el la urbo. Fine la publiko ĝuis belegan folkloran programon, precipe en Esperanto, de la fama artensemblo „Sider Vojvoda“.

Tiu Esperanto-festo en Gorna Orjaĥovica restos vere neforgeŝebla por ĉiuj partoprenantoj.

K. V.

ANIAJ JARKUNVENOJ

RUSE

La 17-an de januaro k.j. okazis jarkunveno de E-societo „Libero“ — Ruse.

Komence oni plenumis mallongan kantprogramon, kiun kunmetis kaj gvidis la E-veterano Boris Kavalĝiev. Sekvis tralego de raporto pri la societa agado dum 1983. Nadja Sirkova, prezidantino de „Libero“, prezentis detalan kaj kritikan raporton, kiu inspiris al pli bona estonta E-laboro.

La eldiroj, kritikoj kaj rekomendoj sufiĉe bone analizis la sukcesojn kaj malsukcesojn de la loka movado. Oni anoncis, ke ĉi-jare komenciĝas konstruado de nova loĝbloko, en kiu estos la nova klubejo de la E-societo.

La jarkunveno de „Libero“ kontribuis al mobilizo de la fortoj kaj al plua supreniro de la agado dum la Nova Jaro. Estis elektita nova estraro el 7 personoj. Kiel prezidanton oni reelektis Nadja Sirkova.

BORIS KAVALĜIEV

ŜUMEN

Okazis jarkunveno de unu el la plej malnovaj enlandaj E-societoj — „Vekigo“ en Ŝumen.

La raportitaj rezultoj denove estas ĝojigaj kaj kuragigaj. Dum 1983 la membronombro kreskis. Per korespondado kun deko da landoj, reciprokaj gastadoj kaj partoprenoj en kongresoj kaj renkontiĝoj la societaj membroj gajnis novajn amikojn de nia socialisma patrolando. La Internacia Lingvo estis instruata fakultative en tri urbaj lernejoj. Daŭris la fruktodonaj kaj intimaj ligoj kun esperantistoj el la frataj urboj Debrecen (Hungario), Magdeburg (GDR), kaj Herson (USSR). Ĉiuj ŝumenaj esperantistoj estas aparte fieraj kaj dankaj, ke la Komunuma Popola Konsilantaro — Ŝumen nomis straton per la nomo de la genia kreinto de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof.

Oni akceptis decidojn, direktitajn ĉefe al popularigo inter la esperantistaro de la 40-jara jubileo de libera, socialisma vivo en Bulgario kaj de la antaŭstaranta 80-jariĝo de la societo.

CVJATKO TODOROV

INTERESAJ AKTIVECOJ

E-societo „Penka Miĥajlova“ en Kolarov-subdistrikto de Sofio jam havas amikan E-societon „Ujlaki“ el dua subdistrikto de Budapeŝto. Ambaŭ E-societoj interŝanĝas sperton, informojn, librojn. En oktobro 1983 „Ujlaki“ aranĝis du kunvenojn, dediĉitajn al la 75-jara jubileo de BEA kaj al Ĥristo Botev surbaze de ricevita E-libro.

Paska Noeva, multjara esperantistino, sukcese gvidas infanan E-kurson. En decembro pasintjare 5—12-jaraj infanoj sub la gvido de societa prezidantino Cvetanka Stojanova-Stankova prezentis belantan programon antaŭ siaj gepatroj, parencoj kaj civitanoj en solena kunveno-koncerto. En la programo partoprenis ankaŭ la aktorino Margarita Somleva el la belarta ensemble de Popola Armeo, Vladimir Vâlčev kaj la fama esperantisto Mišo Zdravec.

E-societo „Penka Miĥajlova“ plivastigos la liĝojn kun la lernejoj kaj la organizaĵoj de Patrolanda Fronto por propagando kaj lernado de la Internacia Lingvo.

MARIA ANGELOVA

VARE JUBILEAS

Pli ol 200 geesperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Bulgario plenigis la salonon de la Kulturdomo en Kubrat, kie la 28-an de januaro 1984 okazis la 10-a jubilea VARE. Ĉeestis gastoj el Koŝice kaj Stara Lubovna (Ĉeĥoslovakio), Värpalota, Veszprem kaj Szombathely (Hungario), multaj partoprenantoj el Ruse, Razgrad, Iŝperih, Silistra, Ŝumen, Varna, Veliko Tŝirnov, Sofio k.a.

Cefa temo de la arango estis: „40 jarojn socialisma Bulgario“. Prelegis Ivan Ivanov, prezidanto de Urba Konsilantaro pri Kulturo — Kubrat. Koncize pri la celoj kaj atingoj dum la 10-jara periodo de VARE raportis ĝia prezidanto Anton Antonov. En la nomo de CE de BEA la jubileulojn salutis Dimitar Mutuŝev, de DE de BEA-Razgrad — d-ro Ivan Kirĉev, de CE de AESR — d-ro Elemir Erby, de CE de HEA — Sándor Kovács, de Fervojista Klubo en Koŝice — Stanislav Krejĉik, reprezentantoj de diversaj distriktoj.

Lernantina grupo kun belarta gvidantino Ĥ. Merdanova prezentis E-programeton. Tuj poste aperis amatora pupteatra grupo ĉe Sindikata Kulturdomo. La belartan programon finis ensemble ĉe la Kulturdomo. Per siaj pitoreskaj kostumoj, belsonaj kantoj kaj viglaj dancoj ili emociis la publikon.

Dum la 10-a VARE regis internacia amika E-etoŝo kaj bonhumoro.

A. A.

SUKCESPLENA AKTIVADO DE E-SOCIETO „SOLIDARECO“

En januaro j.k. okazis la jarkunveno de E-societo „Solidareco“ en la fama bankloko Bankja. La kunveno ĉeestis Kr. Karucin, reprezentanto de CE de BEA, Ĥristo Kanev, prezidanto de la Sofia Urba Estraro de BEA kaj Zora Oŝanska, sekretariino de la Urba Estraro.

En sia raporto Ivanka Spasova, prezidantino de E-societo „Solidareco“, substrekis la sukcesojn dum la pasinta jaro de tiu relative malmultnombra societo. Sendube plej alta supro de la atingoj estis la sukcese organizita kaj realigita Balkana Esperantista Renkontiĝo '83, pri kiu oni jam detale informis. Menciindaj estas ankaŭ la Printempa Renkontiĝo en montodomoj „Najtingalo“ kaj „Ljulin“ kun geesperantistoj el Pernik, la partopreno en „Kaŝtana Vespero“ en montodomo „Belasica“ apud Petriĉ, la konstruado de fontostono „Esperanto“, la partopreno de teatra trupo en la pasintjara Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto, la festo de strato „Esperanto“ kun partopreno de gastoj el la tuta lando, la vigla korespondado kun esperantistoj el diversaj landoj, la aktivado de la Klubo de Esperantistoj-Veteranoj... Ĉio ĉi pravas la pozitivan pritakson de la aktivado de E-societo „Solidareco“, kiu jam vicigis inter la plej iniciatemaj societojn en la ĉefurbo.

I. Spasova menciis ankaŭ la ideon pri organizo de Vintra Esperanto-Universitato; pri interŝanĝo de sperto kun bulgaraj, balkanlandaj kaj aŭstraj ripozkaj kuraĉlokoj. Imitindaj estas la jam tradiciaj E-festoj de mineralakvo en Bankja. Impresas la ideo pri eldono de libro „Esperantista Bankja“ el verkoj de eminentaj bulgaraj aŭtoroj. Lanĉita estis ankaŭ la ideo pri sonbendigo de Esperantaj kantoj sur kasetoj kaj organizo de E-diskoteko en Bankja.

En siaj eldiroj ĉiuj parolintoj direktis laŭdajn vortojn al la estraro de la societo kaj bondeziris ankoraŭ pli vigan aktivadon estonte.

Per belarta programo kaj regalo per la tradiciaj por Bankja rondpano kaj jogurto finiĝis la kunveno.

BORIS ATANASOV



Foto: Emilia Kirilova

Antaŭ dek jaroj dum kunveno en Sofia E-Klubo nia samideano Mladen Mavrov el urbo Belovo konatigis kaj amikiĝis kun finna esperantistino Sirka Poutanen. Ilia multjara amikeco havis feliĉan finon: la 12-an de decembro 1983 en Sofio okazis ilia geedziĝo.

La edziĝfeston partoprenis ankaŭ la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Donĉo Ĥitrov, Stefka Cenkova el CE de BEA kaj Nedka Valjaviĉarska el Sofia Urba Estraro de BEA, kiuj salutis la novajn gedzojn kaj donacis al ili freŝajn florojn.

En sia salutparolo D. Ĥitrov substrekis la malnovan amikecon inter la bulgara kaj finna popoloj kaj esprimis korajn bondezirojn al la nova esperantista familio.

Esperanto ankoraŭfoje manifestiĝis kiel rimedo por interkompreniĝo kaj amikiĝo de homoj el diversaj landoj, kiuj kunigas siajn sortojn pere de la Internacia Lingvo.

M. ANGELOVA

POŝTISTA E-SOCIETO „HEROLDO“ — SOFIO

La 2-an-de februaro k. j. okazis jarkunveno de poŝtista E-societo „Heroldo“ — Sofio.

Raporton pri la pasinta periodo faris Sneĵana Terzieva. Ŝi analizis la variajn arandojn, okazigitajn dum la jaro. Bone impresis iniciato ligo kun la 60-jara jubileo de la Septembra Ribelo 1923 kaj altiro de 12 novaj kaj junaj membroj. Estis farita ankaŭ objektiva kritiko.

Ok ĉestantoj dividis sian opinion. Plej analizajn kaj valorajn eldirojn faris Draguŝko Petrov, prezidanto de IPTEA, kaj Ĥristo Kanev, prezidanto de Urba Estraro de BEA — Sofio. Ili substrekis, ke la progreso de la societo dependas de la bona organiza laboro kaj plua lernado de la Internacia Lingvo Esperanto.

Oni elektis novan estraron kaj kontrolan komisionon.

IVAN JORDANOV

Dum sia veturado tra Sovetunio, ravite de la beleco de l'antikva arto kaj arkitekturo, la pentristino-esperantistino Katja Maneva en sia memstara ekspozicio, malfermita en novembro pasintjare en la Domo de Soveta Kulturo en Sofio, prezentis bildojn inspiritajn de la urboj de Uzbeka Soveta Socialisma Respubliko, kie la ĉarmo kaj majstreco de konstruado dum la jarcentoj impresas per sia diskreta stilo kaj estetika esprimpovo. La bildoj prezentitaj de Katja Maneva estis en la sama stilo kaj en ili evidentiĝis la profesia majstreco kaj krea matureco de la pentristino. Monumentoj de la arto, konservitaj ĝis nun en la urboj-muzeoj Ĥiva kaj Buĥarà estas tiel prezentitaj en ŝiaj bildoj, ke la spektanto havas la impreson, kvazaŭ li proksimiĝus al tiu medio kaj atmosfero, en kiu kreis la antikvaj arkitektoj kaj pentristoj.

En la bildoj, prezentantaj urbon Samarkand, oni vidas rimarkindajn monumentojn de la arkitekturo de XIV kaj XV jc: Sahi-zindà — memoreja arkitektura ensemblo el kultaj konstruaĵoj kun luksa tegaĵo el glazurita terakoto kaj altkvalitaj belartaj mozaikoj: Bibi Ĥanâm kaj la placo Registan. La bildoj estas pentritaj per profesia stabileco, per olea paŝtelo, kiu ebligas pentradon ĉe la objekto mem kaj finpretigon de la bildo en ateliero. En la sama ekspozicio la pentristino prezentis ankaŭ kelkajn bildojn kun subjektoj el Azerbajĝano kaj Armenio, same pentritaj per oleopaŝtelo.

Nur proponante al la homoj la fruktojn de sia celdirektita laboro, la krea personeco restas eterne juna, vigla kaj vivĝoja. Per sia ekspozicio la pentristino Katja Maneva realigis plian valoran kulturen esperantan manifestigon.

RADOSLAV DOJĈINOV

ANONCETO

Esperanto-societo „Ĥristo Kozlev“ (PK 61, BG-5180 Polski Trâmbeŝ, Bulgario) anoncas enketon pri temo „Kion vi scias pri postmilita Bulgario?“ kaj pretas sendi materialojn por eksterlandaj ekspozicioj kaj festkunvenoj okaze de la 40-jara jubileo de nova Bulgario. La plej bone sukcesintaj enketitoj estos premiitaj.

ABONU AL „KOLEKTANTO“!

Ankaŭ dum 1984 „KOLEKTANTO“ aperos 4-foje. La abono, kiel ĝis nun, eblas dum la tuta jaro per nia konto 185/3081 en DSK — Dimitrovski rajon, ul. Ĵdanov 5,1000 Sofio —, Bulgario.

La eksterlandaj gesamideanoj povas aboni la revuon per niaj perantoj.

Abonkotizo: por Bulgario — 1,50 levoj; por eksterlandanoj — 2 dolaroj aŭ egalvaloro.

Fine de decembro pasintjara la belega hungara ĉefurbo denove estis dommastro de la Vintraj Esperantistaj Ferioj (VEF), dektrian fojon ĝi gastame bonvenigis pli ol 200 esperantistojn el naŭ landoj. Dum kvin tagoj en ĝi estis sentebela vera esperantista etoso.

Oni proponis al la VEF-anoj riĉan ĉiutagan programon. La tradicia Interkona Vespere plenumis sian ĉefan taskon interkonatigi kaj amikiĝi diverslandanojn. S-ro Szilágyi malfermis la feriojn, sekvis mallongaj salutparoloj de la grupgvidantoj kaj multe da amuziĝo.

Por la partoprenantoj estis malfacile elekti unu el la tri proponitaj interesaj ekskursoj dum la dua tago. Preferinte viziton de la malnova historia urbo Vác, la bulgara kaj itala grupoj havis la plezuron vidi la Triumf-arkon, konstruitan en la XVIII jc. la imponajn katedralojn, la centran placon kun multaj konstruaĵoj en baroka stilo. La gastamaj esperantistoj el Vác ebligis al ni ĉeesti du bonegajn koncertojn: frapinstrumentan kaj orgenkoncerton, plenumitaj de lernantoj el mezgrada muziklernejo. Ni estis agrable surprizitaj de la speciala belarta salutprogramo, prezentita en la belega, tute nova kaj moderna kulturdomo, kie estas ankaŭ duĉambra E-klubejo por la 60 vácaj esperantistoj.

Vespere, en Budapeŝto, ni spektis pupteatan programon. Estis organizitaj ankoraŭ tri ekskursoj — jam tra Budapeŝto.

Okazis ankaŭ tre utila diskuto inter diverslandaj reprezentantoj, kiu plene anstataŭis la ne okazintan kvizon: „Kiu kion scias“. Estis pritrakitaj diversaj demandoj — instrumentoj de Esperanto, muzea kolekto de esperantaĵoj, E-movado, lingva nivelo, kultura E-agado, eldonado kaj kvalito de Esperanta instru-kaj artiliteraturo ktp. Ĉu la hungaraj organizantoj ne povus inkluzivi en la programojn de la sekvaj VEF similan aranĝon? (Kompreneble, ne anstataŭ la jam tradicia, ege interesa kvizo). Krome, estus bone, se la partoprenantoj disponus pri presita programo. Tio faciligus la elekton de vizitotaj programejoj.

Dum la tutnokta Silvestra Balo ni denove ĝuis multe da muziko kaj dancado. Gaja etoso, vera esperantista amikeco regis dum la Novjara festo. Eble ia programo sub aktora gvido, serĉoj kaj anekdotoj ankoraŭ pliriĉigus ĝin.

Unu semajnon ni pasigis en amika rondo, en utilaj interparoloj kaj diskutoj. Dank' al la peniga laboro de niaj hungaraj amikoj ni ĝuis interesajn programerojn, ni estis en vera Esperantujo.

NEDKA VALJAVIČARSKA

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ renovigas tiun ĉi rubrikon, kiu ekzistis dum jardekoj. Artikoloj, informoj kaj mencioj pri Esperanto abundas en la bulgara gazetararo kaj ni insiste petas niajn kunlaborantojn kaj legantojn informi nin pri ĉiu presperanta materialo, aperinta en kiu ajn periodaĵo bulgarlingva. La rubrikon gvidas nia redakciano K. Karucin.

EN SOFIO:

Jurnalo „Rabotničesko Delo“ (7. 1. 1984) sub titolo „Tribuno de la justeco“ aperigas kvarkolumnan artikolon pri la bulgarlingvaurnalo „Mejdunaroden Rab-selkor“, eldono de Bulgara Laborista Esperantista Asocio (BuLEA). La artikolon verkis Marija Jankova, redaktoro en „Bulgara Esperantisto“. J. „Oteĉestven Front“ (13. 1. 1984) donas lokon al informo de Verka Stajner pri preparaj laboroj lige kun la 36-a IFEF-kongreso, okazonta en nialando en majo j.k. J. „Trud“ (6. 1. 1984) skribas pri interesa kolekto de ĉeĥa instruisto. Temas pri eldonoj de „Komunist Manifesto“ de Marks kaj Engels en diversaj lingvoj. Kiel valorajoj de la kolekto estas menciitaj la ĉeĥa eldono de 1898 kaj ankaŭ Esperanta eldono de la libro. J. „Veĉerni Novini“ (23. 1. 1984) skribas, ke en Lucerno (Svisio) okazis la tradicia jam 35-a konkurso pri rapida skribado per stenografio. Ĝia laŭreato f-ino J. Laza el Berno stenografis en 6 naciaj lingvoj kaj en Esperanto. La semajna kultura gazeto „Narodna Kultura“ (6. 1. 1984) aperigas skizon pri Dimităr Andreev, esperantisto el Asenovgrad. Oni mencias ankaŭ lian agadon kiel posedanto de Esperanto-librejo „D-ro Zamenhof“ en la pasinteco. La skizo, kiu okupas tri kolumnojn, estas verkita de Petko Hristozov, instruisto el Plovdiv. La semajna urnalo „Transporten Glas“ (18. 1. 1984) detale informas pri la antaŭstaranta kongreso de IFEF.

EN LA PROVINCO:

J. „Borba“ — Veliko Târnovo (5. 1. 1984) donis lokon al dukolumna artikolo de Olga Cankova pri la iama laborista esperantista societo „Liberiga Stelo“ en urbo Kilifarevo. La sama urnalo (19. 1. 1984) informas pri solenaĵo en urbo Gorna Orjaĥovica honore al la 75-jara jubileo de la loka E-societo „Espero“. J. „Oteĉestven Glas“ — urbo Plovdiv (11. 1. 1984) sur du kolumnoj donas lokon al recenzo (kun klišo de la kovrilpaĝo) pri la originala esperantlingva poezia kolekto „Ribela Kordo“ de Hristo Gorov. La recenzo verkis Ivan Sivarov, urnalisto, veterano de la E-movado en nia lando. J. „Septemvri“ — urbo Stara Zagora (7. 1. 1984) informas pri Zamenhof-solenaĵo en la Kulturdomo de Transportistoj, organizita de la loka fervojista E-societo. J. „Zarja na Komunizma“ — urbo Loveĉ (10. 1. 1984) presigas kvarkolumnan artikolon de d-rino Tjuran Omer pri vastaj ligoj de la esperantistoj el Loveĉ kun eksterlando. J. „Botevgradski Plamak“ — urbo Botevgrad (28. 1. 1984) detale informas pri multnombra distrikta lernejana E-kurso en Botevgrad dum la vintraj ferioj.

KOREKTO

En n-ro 12/1983 de „BE“ estas allasita eraro sul paĝo 16. En la unua kolumno supre la cifero de la Kongreso de Blindaj Esperantistoj estas 51-a, sed ne 31-a.

La redakcio pardonpetas.

Sur la unua kovrilpaĝo: „Martenci“ — grafikaĵo de Angel Angelov



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Juna geedza paro — Dimităr Burdev (36-jara ofisto) kaj Veneta Burdeva (27-jara infana instruistino) — str. „D-ro N. Kovačev“ 7, BG-4002 Plovdiv — kun ĉi pri muziko, fremdaj lingvoj, diapozitivoj, vojaĝoj, naturo, radio, TV-tekniko; kol. bk, pm.

Nikola Nikolov — str. „Čapaev“ 2, vĥ-9, BG-1113 Sofio — interŝanĝas karikaturojn kaj anekdotojn pri vojaĝoj kaj turismo, E-insignojn, etikedojn, glumar-kojn kaj prospektajn.

Petăr Hristov Paisiev — str. „Car Simeon“ 87, BG-1202 Sofio — kun ĉi.

Anuška Petrova (17-jara instruistino) — NOU „Hristo Botev“, Čerese, distr. de Burgas — kun gejunuloj el la tuta mondo.

26 lernantinoj (15—17-jaraj) deziras korespondi tutmonde kun samaĝuloj. Komuna adreso: Ivan Bajčev, ESPU „Hr. Smirnenski“, BG-9410 v. Krušare, distr. de Toluŝin.

Ĝelernantoj deziras korespondi kun ĉi pri ĉi. Adreso: Lernanta E-Societo „D-ro Zamenhof“, ESPU „Otec Paisij“, BG-6600 Kargali.

Ĝelernantoj deziras korespondi kun ĉi pri ĉi. Adreso: Lernanta Esperanto-Societo, 6-a ESPU „Kiril kaj Metodi“, BG-3700 Vidin.

Stanka Pančeva (32-jara fraŭlino) — blok 208, vĥ. V, ap. 6, BG-5500 Loveč — kun ĉi.

Stefka Hristova (22-jara instruistino de muziko) — str. „Sipka“ 6, BG-5200 Pavlikeni — kun ĉi pri muziko.

Diana Slaveva Mladenova (15-jara lernantino) — str. „Sredna gora“ 47, BG-2260 Svoĝe, distr. de Sofio — kun ĉi pri ĉi.

Stanka Hristova Daskalova — ĵ. k. „Mladost“ — 2, blok 216, vĥ. G, et. 2, ap. 4, BG-1199 Sofio — kun ĉi pri maŝin- kaj manbrodado kaj florkultivado.

21 ĝeesperantistoj (9—60-j.) el Jambol deziras korespondi kun ĉi pri ĉi. Komuna adreso: Dima Trudoljubov, str. „Al. Stambolijski“ 65, ap. 13, BG-8600 Jambol.

Juna geedza paro Liljana Paraŝkevova kaj Dimităr Paraŝkevoj — str. „Kabile“ 40, vĥ. A, ap. 4, BG-8600 Jambol — kun ĉi pri ĉi.

Ĝelernantoj (15—17 j.) deziras korespondi tutmonde pri ĉi. Adreso: Evelina Kalčeva, Gimnazia Esperanto-Klubo, BG-5180 Polski Trâmbeŝ.

Veselin Nankovski (45-jara instruisto) — str. „Dimităr Milčev“ 10, BG-2050 Ihtiman — kun ĉi pri pedagogiaj problemoj, turismo, fotografio, ĉasado, muziko.

Vera Nankovska (13-jara lernantino) — str. „Dimităr Milčev“ 10, BG-2050 Ihtiman — kun samaĝulinoj pri ĉi.

Janka Vălčeva Ilieva (30-j.) — str. „Kableŝkovo“ 26, blok „Vejen“, et. 8, ap. 31, BG-5500 Loveč — kun ĉi pri ĉi.

Eleonora Marinova (lernantino en 7-a klaso) — zavodski blok 24, et. 3, ap. 9, BG-5500 Loveč.

Lilija Sergeeva Aleksieva (20-jara fraŭlino) — ĵ. k. „Al. Stambolijski“ 6, blok 6 b, vĥ. M, et. 6, ap. 286 — kun ĉi, kol. pm, poŝkalendaretojn, buŝtukojn, insignojn.

ĈEĤOSLOVAKIO

Karel Hajek, Kněžskovodvorská 13, CS-370 01 Česke Budejovice — kun ĉi pri artoj, historio, popol-kutimoj, filmoj, vojaĝoj kaj filatelo. Interŝ. pm, bk, ilustr. magazinojn kaj alumetajn glumarkojn.

Miloslava Amlerová (37-jara oficistino) — str. B. Nemcove 376, CS-542 01 Zlčlčf, — kun ĉi pri vivmaniero, ĝardenoj, turismo k.s.

GDR

Familio Helmut Bein (40-jaraj ĝeinstruistoj) — 4090 Halle-Neustadt, Block 147-2 — dez. kor. kaj interŝ. pm, bk, pupetojn; eblas reciprokaj ferioĝastadoj kun Bulgario, Hungario, Pollando kaj Sovet-Unio.

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

En 1983 en urbo Popovo forpasis en sia 70-a jaro nia karmemora

MIĤAIL CONEV KJA ĤMILEV,

E-veterano kaj aktivulo, eksa prezidanto de la kontrolo komisiono de E-societo „Homeco“ — Popovo.

En 1980 li estis distingita per ora insigno de BEA pro lia multjara poresperanta laboro.

En oktobro 1983 en vilaĝo Gagovo, distrikto de Târ-goviŝte, forpasis la E-veterano

IVAN IVANOV KOLEV

En 1980 Ivan Kolev estis distingita per ora insigno de BEA.

La 2-an de januaro 1984 post longa kaj grava malsanado forpasis

STEFAN DARGONOV,

esperantisto, multjara prezidanto de E-societo „Brila Stelo“ en vilaĝo Răjevo Konare, Plovdiv-distrikto.

La 31-an de decembro 1983 post mallonga malsanado forpasis en sia 73-a jaro la esperantisto-veterano

SOTIR KOSTADINOV VASILEV

Multajn jarojn li abnegacie laboris por disvastigo de la Internacia Lingvo kaj por firmigo de E-societo „Radio“. Vasilev okupis diversajn postenojn en la Urba kaj Distrikta Estraroj de BEA — Pazargik.

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV
Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI,
Radoslav DOJČINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr ĤAĜIEV, Krăstju KARUCIN.

Administranto — ASEN JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

P.K. 63


1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

1090 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

ALBERT EINSTEIN KAJ LA STUDPROCESOJ



*La Kosmo estas fina (finhava),
sed ĝi ne havas limojn. . .*

*La planedoj ne roĉdiras ĉirkaŭ
la suno pro gravito, sed pro „kurbi-
go“ de la Kosma spaco. . .*

*Ciu en la Kosmo mezuras per sia
propra metro kaj per sia propra
horloĝo — ĉio estas relativa! . .*

Albert Einstein

Jam el ĉi-supraj pensoj de Albert Einstein oni vidas, ke tiu scienca geniulo donis al la ekkono de la Kosmo ion tute novan. Kaj ne nur „ion novan“, sed, fakte, ion vere revolucion: niaj fiksjaj (kutimaj) nocioj (ideoj) pri Kosma spaco, tempo, forto kaj eĉ pri la Kosma materio — mem ĝisvivis, dank' al Einstein, totalan transformiĝon.

Al la personeco kaj la faro de la granda mondfama fizikisto estas dediĉita la nuna etapo de la Longdaŭra Kompleksa Programo por Altigo de la Rolo de Arto kaj Kulturo por ĉiufanka kaj harmonia evoluo de la individuo en Bulgario.

La programo „Einstein“ estas ligita precipe kun la teknika kaj scienca-krea aktivado de la bulgara junularo, kun la evoluo de la scienc-teknika revolucio kaj ĝia influo sur la individuon.

Riĉaj kaj variaj estas la formoj, per kiuj realiĝas la programo „Einstein“ en Bulgario.

Estis okazigitaj renkontiĝo „Scienco, tekniko, arto“ de reprezentantoj de diversaj sciencaj branĉoj, kolokvo „Arto kaj Tekniko“, Nacia Renkontiĝo de Fizikistoj, seminarioj „Olimpio“, dediĉitaj al la personeco kaj la sciencaj Verkoj de Einstein, Nacia Kvizo „Kion mi lernis pri Einstein“. Pri tiu ĉi kvizo la vicministro de Popola Klerigo, la eminenta bulgara poetino Liljana Stefanova klarigis en intervjuo:

„La kvizo havis du ĉefajn direktojn: unue — verkado de referaĵoj pri konkreta scienca temo, kaj due — kvizo organizita kiel konkurso pri problemoj, sur kiuj laboris Einstein en la sfero de ĝenerala fiziko. Tiu ĉi kvizo provokis grandan interesiĝon ĉe la gejunuloj, kiuj montris bonegan informitecon en la prezentitaj referaĵoj. La gejunuloj invadis bibliotekojn kaj sciencajn institutojn, efektiviĝis multajn renkontiĝojn kun eminentaj sciencistoj-fizikistoj por konsultiĝoj kaj interparoloj. Ĉio ĉi sendube kontribuis por plialtigo de iliaj konoj, por enprofundigo en la teoriojn kaj en la sciencajn verkojn de la granda fizikisto Einstein. La kvizo estis elsendita per la Bulgara Televido kaj akiris vastan popularecon en la tuta lando.

La programo „Albert Einstein“ estas la kvina etapo de la longdaŭra edukprogramo, kies iniciatinto estis la neforgesebla ŝtata kaj kultura agantino Ljudmila Jivkova. Tiu ĉi programo sin apogas sur tiuj edukaj kaj studaj momentoj, en kiuj respeguliĝas la rimarkinda ekzemplo de la eminenta scienculo kaj kreanto Einstein kaj stimulas la memklerigon kaj evoluon de la nuntempa individuo.“

Kaj en la fino de tiu mallonga informartikolo ni revenu al la pensoj de la „kulpulo“ por tiuj linioj.

En la Einsteina Teorio de Relativeco estas fama „relativeca rakonto“ pri du fratoj-ĝemejoj: kiam ili estis 20 jarojn aĝaj, unu el ili decidis vojaĝi tra la Kosmo per kosmoŝipo kureganta per rapido pli granda ol 200 000 kilometroj en sekundo. Post 20 jaroj de flugado la frato-vojaĝanto revenas al la Tero kaj, jen, granda surprizo por ambaŭ fratoj: tiu, kiu vojaĝis ŝajnis esti evidente pli juna ol tiu, kiu restis sur la Tero! Post mallonga interŝanĝo de informoj ili konstatis, ke unu el ili (tiu, kiu vojaĝis, havas 40 jarojn kaj tiu, kiu restis sur la Tero — havas 60 jarojn! . .

Jes, laŭ la Teorio de Relativeco kaj laŭ la eldiro de Einstein mem tio estas normala, ĉar „ĉiu en la Kosmo mezuras per sia propra metro kaj per sia propra horloĝo. . .

D. SIMEONOV